

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Aristóphio A. Alves Filho

Monique Arnaud

Jennifer Bishop

Luiza Carol

Magdaléna Feifíčová

Heidi Goes

Mireille Grosjean

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Márta Kovács

Katalin Kovács

Stefan MacGill

Emile Malanda


Bardhyl Selimi

Gizela Sklorz

Grażyna Szubryczyńska

Anna Tóth-Deme

Penny Vos



**ilei**



---

## ENHAVO

---

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i> .....	3
<i>Kompleto, pleto, pledo</i> .....	4
Penny VOS, Jennifer BISHOP: <i>Invito al la tuta vasta mondo</i> .....	5
Márta KOVÁCS: <i>Esperanto estas materio (II.)</i> .....	10
Penny VOS: <i>Reta Edukada Konferenco – grava por ni!</i> .....	13
<i>Novaj planoj: ILEI estrarkunsidis en KAEST</i> .....	15
Grażyna SZUBRYCZYŃSKA: <i>El somera E-ujo: Metodika kaj interkultura spertiĝo</i> 17	
Gizela SKLORZ: <i>Esperanto en universitata konferenco</i> .....	19
Monique ARNAUD: <i>Tago de la Instruistoj ĉe UNESKO</i> .....	21
Emile MALANDA: <i>Sud-Afriko: 125 jaroj de Esperanto</i> .....	22
Luiza CAROL: <i>Pri „Esperanta Retradio” (ERR)</i> .....	24
Anett TÓTH-DEME: <i>Raporto pri ES-FESTO</i> .....	26
<i>Ni funebras</i> .....	27
<i>El la landoj kaj sekcioj (BJ, BR, CZ, ID, PL)</i> .....	31
<i>Novajoj de edukado.net (Katalin KOVÁTS)</i> .....	35
<i>Vokas la 46-a Konferenco de ILEI en 2013 (informoj, aliĝilo)</i> .....	37

---

## ESTRARO DE LA LIGO

---

**Prezidanto:** Stefan MACGILL, Pannónia u 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

<ilei.prezidanto@gmail.com>. Tel. fiksa (+36 1) 349-5207. Kunordigo, partneroj, regularoj, kurso 125, Juna amiko.

**Sekretario:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio.

<ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. fiksa (+381) 32 371053. Sekretariaj taskoj, edukprojektoj kaj konferencoj.

**Estrarano pri financoj:** Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. fiksa (+ 510) 653 0998. Financaj kaj kasistaj aferoj.

**Vicprez.:** Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso fiksaj: (+49) 5521-5983. LKK de la 46a konferenco, E-centroj, instrukapbligado, ekzamenoj.

**Vicsekr.:** Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi), Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com> . Membro-administrado, rilatoj kun aliaj fakaj asocioj.

**Estrarano:** GONG Xiaofeng (Arko), School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN 330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Azia agado, universitata agado.

**Estrarano:** Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo.

<nespa.1990@gmail.com>. Tel. (+1) 620 9877. Eksteraj rilatoj, universitata agado.

**Estrarano:** Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario.

<enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365. Instrukapbligado, ekzamenoj, kalendaro, membro-varbado.

**Estrarano:** Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Landa kaj lerneja agado, eksteraj rilatoj, instrumaterialoj, reta kontaktado.

## Scienca Komitato

**Prezidanto: Humphrey Tonkin,**  
Usono, University of Hartford; AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke,**  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### Membroj:

**Vera Barandovská-Frank,** Germanio,  
Universität Paderborn; AIS<sup>2</sup>

**Duncan Charters,** Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti,** Italio, Università degli  
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta,** Barato, LRU, Indian  
Statistical Institute, Kolkata; AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz,** Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius,** Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Wim Jansen,** Nederlando, Universiteit  
van Amsterdam

**Boris Kolker,** Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iona Koutny,** Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza  
w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Maria Majerczak,** Pollando, Uniwer-  
sytet Jagielloński w Krakowie

**Geraldo Mattos,** Brazilo, Federacia  
Universitato de Paranao; AdE<sup>1</sup>

**Aleksandr Melnikov,** Rusio, Академия  
Сельскохозяйственного  
Машиностроения

**Radojica Petrović,** Serbio, Univerzitet  
u Kragujevcu

**Balázs Wacha,** Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

**Sekretario: Aida Čižikaitė,** Litovio

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

<sup>2</sup> AIS – Akademio Internacia de la  
Sciencoj, San-Marino

Dorskovrile supre: *Memore pri la unua afrika konferenco de ILEI: la tiam plantita E-arbo en Portonovo dume kreskis, same kiel kreskas la tiam semita ILEI-agado en Afriko (p.22, 31.)*  
Dorskovrile malsupre: *Renkontiĝo de E-fakmanaĝeroj en la universitato de Szeged (Hungario) (p.26.)*

## Enkonduko

*Karaj Legantoj,*

Mi skribas la nunajn liniojn tri semajnojn post nia oficiala redaktofino. Ekstere frostas kaj neĝas. Mia ĵus operaciita hundino trankvile ronkas en la apuda fotelo. Nia Prezidanto estas en la same frosta Varsovio kaj en la reto nun videblas eĉ ne unusola estrarano aŭ redaktciano. Do, la tuta respondeco restas sur miaj ŝultroj: mi devas mem solvi la lastajn solvendaĵojn pri la numero kaj fermi ĝin sola, se mi volas, ke ĝi atingu niajn legantojn antaŭ la jarfinaj festoj.

En la nuna numero vi trovos malmulte da teoriumado, sed abundas informriĉaj artikoloj el ĉiuj mondopartoj: esperigaj novaĵoj el Aŭstralio (vd la artikolojn de Penny Vos), du raportoj el Afriko, tri el Pollando, sed reprezentigaĵas ankaŭ la amerika kaj azia kontinentoj. Fine de la revuo vi trovos konferencan aliĝilon kaj la aktualajn informojn pri nia sekvajara Konferenco en Herzberg-Sieber (Germanio).

Ankaŭ malĝojigaj novaĵoj ne mankas, ni perdis niajn kvar eminentajn membrojn en tri kontinentoj: forpasis Li Shijun, nia nova HM en Ĉinio, Vasil Pistoli, nia albana sekciestro, Dori Vallon-Wheeler, DM de AAIE (Usono), kaj Johano Kirsch, fervora membro de nia hungara sekcio. La nova jaro alportu pli ĝojigajn informojn al ni! Agrablan legadon!

*Jozefo NÉMETH, redaktoro*

## Kompleto, pleto, pledo

**KOMPLETO** de la estraro neniel povas fizike kunsidi, ja estraranoj venas senprecedence el kvar kontinentoj. Sed kvin el naŭ ja tion faris mez-novembre en Modra, Slovakio, kun skajpado al aliaj – pri tio legu sur paĝo 15. Defio por ILEI en estontaj jaroj estos arigi sufiĉajn financajn rimedojn por ebligi al aktivuloj en ĉiu kontinento partopreni en niaj plankunsidoj kaj konferencoj.



**PLETO** venas el la oktobra simpozio en Rumanio, kie ja produktive kunsidis kaj laboris tri estraranoj. Plecto ... kio!? Ni klarigu. En la oktobra numero de la revuo de UEA (*Esperanto*), ILEI tiris atenton al si, pere de la mirinda ‘kongresa sako de la jarmilo’ [*vd dekstre*] – tiu el nia konferenco en Kunmingo. Feliĉe eĉ tiu digna revuo allasis leĝeran satiraĵon (esperindas, ke niaj pli movade sagacaj legantoj komprenis la satir-celon). Nun, ni daŭrigas tiun metaforon. Ni dronas en kongresaj libroj, ŝildoj, glumarkoj, plumoj, kol-rubandoj, manĝkuponoj... Sed, laŭ niaj fundaj esploroj, neniuj,

NENIU, iam ajn ĝis oktobro 2012 elpensis la genian ideon de kongresa aŭ simpozia PLETO. Niaj rumanaj kolegoj ja tion faris, do ILEI omaĝas al tio, pere de lanĉo de plia premio en la sama serio: ‘Jubilea pleto de la jarcento kaj kvarono’. Ni defias niajn sekciojn, elpensu similan unikaĵon por iu via estonta renkontiĝo, por ke ILEI honorigu ankaŭ vin.

**PLEDO** rilatas al la estonto de ILEI. Denove nia Komitato estos petata aprobi buĝeton kun signifa deficitito – tiu por 2013 ja malplias ol 2012 – tamen: kial ILEI eterne deficitu ĉar la movado persistas erare opinii, ke la instruistoj en ILEI devas financi la tutan instru-programon de E-o? Se ILEI povus akiri mil membrojn, ĝi havus la kapablon movi sin el la teritorio de sensignifeco, kaj fakte realigi serioze siajn planojn. Unuafoje ni nomumis estraron por specife okupiĝi pri varbado. Ni pretigis varbilon por 2013,

kiu prezentas la novajn estraranojn, kune kun iliaj aspirioj. Mendintoj de la fizika IPR trovos ĝin kune. Retaj membroj trovos ĝin ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info). Uzu ĝin por varbi novajn membrojn ekster la rondo de jamaj membroj, kaj por varbi abonantojn por *Juna amiko* – la lasta pluvivanta fizike presata revuo por lernantoj. Se vi havas eblon utile eluzi tion, petu plian stokon de la prezidanto.

ILEI reklamadas sin: ‘la ligo kun igo’. De kie venas tiu igo? Ne de ekstere. Ne de supre. De VI. VI ĈIUJ. Komprenu, VI ESTAS NIAJ IGISTOJ. IGU NUN KUN NI.



*La Estraro de ILEI*

## Invito al la tuta vasta mondo

*Prelego pri aŭstralia projekto ALL – Apprenticeship Language Learning verkis Penny VOS, prezentis en la simpozio de Kunmingo Jennifer BISHOP*

Estas por mi hodiaŭ privilegio paroli al vi pri tre grava Aŭstralia projekto de mia juna kolemino, Penny VOS, sperta instruistino laŭ metodo Montessori kaj klera esploristino pri la maniero utiligi siajn studojn kaj spertojn por evoluigi novajn instrulibron kaj kurson por bazaj lernejoj, kun infanoj 5-11-jaraj. Ĉi tio estas kvazaŭ sekvo de la projekto EKPAROLI (Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al Rapidigo de Orient-Lingvo-Instruado), kiun mia edzo d-ro Alan BISHOP kaj mi kreis ĉe Universitato Monash en la jaroj 1994-97. Hodiaŭ mi parolas pri la nova kurso de Penny VOS ‘*Apprenticeship Language Learning* – ‘ALL’ (en la angla lingvo: ‘Ĉiuj’). En Esperanto ni povas diri: provizado per lingvolernado kiel metio, por kuraĝigi instruistojn de bazaj lernejoj tra la tuta mondo konvinkiĝi pri la granda valoro de Esperanto-lernado por ĉiuj infanoj. Celatoj estas studentoj de universitatoj, de kolegioj pri instruisto-trejnado kaj instruistoj de bazaj lernejoj.

En Aŭstralio, ni identigas ok ĉefajn lernokampojn. Ili estas: la Angla Lingvo, Matematiko, Scienco<sup>1</sup>, Sociaj Studoj, Arto, LOTE/LAOLA (Lingvo Alia Ol La Angla), Desegnado kaj Teknologio, Sano kaj Korpa Ekzercado. Ĉiu universitato en Aŭstralio ekipas instruistojn de baza lernejo por instrui almenaŭ sep el tiuj kampoj. Pro la multlingveco de Aŭstralio, ni tute ne povas nomi kiu aŭ kiuj lingvoj plej gravas al aŭstralia infano. Pli ol 200 lingvoj estas ĉiutage parolataj. Tamen ni ja scias, ke la kapablo fariĝi multlingva estas same normala por infanetoj, kiel fariĝi artista, atleta, matematik-kapabla, muzika kaj pli. Estas la devo de baza edukado konservi por infanoj la malfermitecon al elektoj en ĉiu lernokampo ĝis ili estos sufiĉe aĝaj por mem elekti specialan kampon.

Cent-hora kurso pri Esperanto donas kvar avantaĝojn:

- Plifortigo de la kapablo koncentriĝi
- Pli rapida lingvolernado.
- Pli altigita kapablo kompreni la formalan anglan aŭ alian denaskan lingvon
- Ekzercado de penskapablo sur pli alta nivelo

Tiel, dum la unuaj 100 horoj de instruado, per ĉi tiu nova kurso studentoj estos ekipataj per lingvaj komprenoj kaj metodiko por provizi sin per flua intrakultura metiolingvo. Kompreneble la nura lingvo sufiĉe simpla por lerni dum dusemajna intensiva kurso estas E-o. Unike ĝi estas kreita por rapida lernado kaj tutmonda interkomunikado.

1. La neŭoscienco nun diras al ni ke dulingvaj cerboj estas strukture pli bone ekipitaj por elimini malatentigaĵojn kaj koncentriĝi. Ne gravas la lingvo, sed ja gravas ke ili estu tute mastrataj en la infanaĝo.

2. Frua mastrado de E-o rapidigas la lernadon de postaj lingvoj per superrigardo de la ĝenerala maniero en kiu funkcias lingvoj kaj kiel lerni ilin; ĝi plie donas pli da memfido kaj motivado. Ĉu ĉi tiu avantaĝo ne montriĝas pli forta ol la avantaĝo pasigi cent aŭ pli da horoj lernante la cellingvon?

3. Lernado de alia lingvo helpas la komprenadon de la formala angla, sed E-o estas eĉ pli subtenanta, ĉar ĝi havas travideblan gramatikon. Ĉi tio signifas ke substantivoj, adjektivoj, adverboj, pronomoj kaj ses verboformoj estas ĉiuj facile rekoneblaj per la lastaj literoj. Kiel diris

---


<sup>1</sup> En la teksto 'scienco' rilatas naturscienccon – NDIR

angleparolanta infano antaŭnelonge „Mi scias ĉu vorto estas adjektivo vidante ke ĝi finiĝas per 'a' en Esperanto”.

4. Eble ŝajnas surprize, ke solvo proponanta simplecon povus pretendi ankaŭ prizorgi penskapablojn sur alta nivelo, sed instruante E-on unue, tion ĝi ja faras. Penskapablo je alta nivelo bezonas ekzercadon por fariĝi kutima, kaj la manko de ideosinkrazaj bagatelaĵoj kiel en la angla 'I' antaŭ 'e' escepte post 'c' lasas pli da tempo por ekzerci komprenadon, aplikadon, analizon, taksadon kaj kreadon.

La maldekstra desegnaĵo venis rekte el Wikipedia kaj spegulas la ideon de fama psikologo, d-ro Benjamin BLOOM pri la maniero en kiu pli alta pensnivelo konstruiĝas sur la baza nivelo. Ĝi larĝiĝas ĝis ĝi ampleksas plurajn same esencajn kapablojn en la fina stadio. La dekstra desegnaĵo estas tordita por montri kiel plejparto de memorado bezonata en plej multaj lingvoj limigas la tempon haveblan por ekzerci sin sur pli altaj pensniveloj. Per la uzado de E-o kiel unua fremda lingvo instruata, ni povas doni al niaj infanoj okazon ekzercadi la plenan gamon de la penskapabloj.

### *Laŭ la taksonomio de Bloom pri kognaj celoj*



*La piramidoj montras la malsamajn proporciojn de la tempo restanta por ekzerci kaj atingi altnivelajn edukcelojn kiam la lingvo lernata en limigita tempo estas (maldekstre) Esperanto – kun intence malpliigitaj scienderoj aŭ neplanita lingvo (dekstre).*

La kvar sociaj kaj emociaj avantaĝoj por studentoj, kiam oni kompletigas kaj aplikas ĉi tiun kurson, estas: memfido; sento de apartenado al la Tera Komunumo; rezistado al 'Affluenza' (t.e. riĉabundo: fiera membriĝo al aparta mezklaso, sed sen posedi havaĵojn ĝi estas deprima); kaj eblo identigi sin kun kreema problemsolva kaj socia justeco.

1. Memfido evoluas el sukceso... Jen du ekzemploj de la kreo-traĵtoj kiujn aparte alirebligas E-o:

- a) Post lerno de dudek ok daŭrajn sonsimbolajn parojn, multaj el ili tre similaj al la anglaj, eblas literumi ion ajn bone en E-o.
- b) Leĝo de regula emfazado de komence memfide ebligas laŭlegadon. Emfazu la silabon antaŭ la fina.

Kiel vi ja scias, entute E-o estas resumebla per dek ses reguloj de gramatiko, neniom da esceptoj, kaj sistemon de vortkonstruado kiu fideble kaj rapide provizas per granda vortostoko.

2. Komprenoble la funkcio de lingvo estas komunikado, kaj alireblo al aliaj kulturoj estas grava por evoluado de tuttera civitaneco, kultura identigiĝo por ĉiuj studentoj. E-o estas tutmonda lingvo, kaj ĝi nutras intereson pri plej vasta miksaĵo de aliaj kulturoj kaj medioj.

3. Infanoj en Benino, okcidenta Afriko, emfazas pluan avantaĝon de E-uzado en frua infanaĝo. Niaj infanoj en Aŭstralio riskas esti infektitaj de riĉabunda sento ke ili estas mezklasaj sen havaĵoj kaj malsekuraj rilate monon, kvankam ili neniam suferis malsaton kaj ili loĝas en domoj, multe pli luksaj ol en antaŭaj generacioj. Unu metodo por kontraŭigi ĉi tiun depriman malsanan mispercepton estas doni al ili kontakton kun aliaj kulturoj, kiuj estas same feliĉigaj kiel nia, sed kun multe malpli da materia riĉeco. La tergloba komunumo de Esperantoparolantaj gelnantoj de bazlernejoj inkluzivas infanojn el multaj tiaj kulturoj, same kiel materie riĉajn infanojn.

4. Esperanto estas bona ekzemplo de kreiva problemsolvado, diligenteco kaj socia justeco, al kio niaj studentoj povas esti identigitaj por helpi sin evoluigi propran potencialon cele al atingo de grandiozaj aferoj.

Mi esperas, ke vi ekscitiĝas pro la eblo prezenti kurson tiom gravan por studentoj, – sciade, socie kaj emocie .



Infanoj profitos multe de ofta malfermiĝo kaj potenca rolmodelo de vivolonga lernado, kiun la lernintaj studentoj kaj instruistoj mem povas plej bone havigi.

Ili estos nekutime bonŝancaj ĉar al ili estas ofertata merganta medio, la plej bona ekzemplo de lingvolernado konata kun fidinda daŭro ĝis kompletiĝo.

La kompleto *Talking to the Whole Wide World* inkluzivas interkulturan esploradon, lingvoklarigojn, uzadon de kantoj, rakontoj, poemoj kaj ŝercoj, interretaj rimedoj, skajpo, retpoŝto, konkursoj, videobendoj, granda gamo da lernoludoj, kaj firmigaj ekzercoj.

La enira kurso nuntempe por angleparolantaj studentoj daŭras du semajnojn. Per ĝi oni travivas la kvardek lecionojn kaj lernoaktivaĵojn de “Talking to the Whole Wide World”. Poste, kiel instruisto, ili povos instrui kaj gvidi, por ke la lernantoj neniam estu devigitaj forlasi ilin kiel unulingvanoj. [*Recenzo pri la verko aperos en la sekva numero de IPR.*]

La kompleto de instrukapabloj por instrui fremdan lingvon kiun studentoj lernos, estas jam favore recenzita de aŭstraliaj altrespektataj spertuloj pri lingvoedukado. Ĝi estas grava kurso tiel ke rezultos mastrado de lingvo, tamen ĝi estas planita por engaĝi. Mi vetas ke studentoj kaj instruistoj ĝuos kaj la lernadon kaj la instruadon. Dankon pro via aŭskultado!

Se vi volas respondon al la demando “Ĉu eblas, ke la libro estu uzata en alia lingvo ol en la angla?” – mi povas respondi: “Jes, certe”. Ĝi jam estas tradukita en plurajn lingvojn: la francan, Esperanton, la indonezian, brazil-portugalan, serban, hispanan kaj persan.

*Jen la komencaj frazoj de la prelego en ĉina lingvo:*

### **向全世界发出的邀请**

Penny VOS, Jennifer BISHOP, ILEI, Aŭstralio:

今天我很荣幸向你们讲述我的青年女同事本妮沃斯的实验项目。她是蒙特索里教学法的很能干的教师；又是训练有素的研究人员，能将自己的研究和经验来为基础教育（针对5-11岁的儿童）设计编排新的教材和课程。

她这个项目似乎继续了《EKPAROLI》（把世界语作为东方语言教学速成班的预备课）项目（译者按：项目名称隐藏着一个世界语词“说起来”），那是我和我的丈夫1994-1997年间在摩那士大学创设的。

# „ Esperanto estas materio ”

## *Spertoj de lerneja gasteinstruistino en Sicilio – 2-a parto*

Pri la cirkonstancoj de la instruado, pri la rezultoj de la dua kontrolo kaj pri la komparo de la dua kaj tria kontroloj oni povis legi en la unua parto de la artikolo, en la antaŭa numero de IPR. Sube sekvas la analizo de kelkaj rezultoj de la tria kontrolo.

La trian kontrolon la lernantoj plenumis dividiĝinte en 65 grupoj. Dum la prilaboro de la rezultoj krom la „boneco” mi ekzamenis ankaŭ la **plenumitecon**. Pro la cirkonstancoj de la testado la manko de solvoj povis rezulti el malpli rapida laborritmo, el manko de gruplabora kaj diversaj aliaj strategioj, sed eble ankaŭ el sinteno: laboremo/mallaboremo, kiun influis la ĝenerala engaĝiĝo de la grupanoj. Ĉiujn 22 taskerojn faris 2 grupoj, tri kvaronojn de la taskeroj faris 15 grupoj (el 7 malsamaj klasoj), tri kvaronojn ne faris 11 grupoj (el 9 malsamaj klasoj). Averaĝe la pli junaj faris malpli da taskeroj (11 en la 4-aj klasoj, 13 en la mezgradaj), sed la distribuo montras ne laŭaĝan, sed laŭklasan diferencon. 38% de la eblaj eroj (el  $65 \times 22 = 1430$ ) restis nefaritaj. La plej alloga estis la taskero pri Mazi: ĉiu grupo laboris pri ĝi; pri ŝatoj nur kvar grupoj skribis nenion. Kaze de la duonliberaj sinesprimoj, pri ŝato sep kaj pri tagordo tri grupoj uzis alian lingvon: la gepatran aŭ la anglan. La malplej populara taskero estis la korektado de eraroj, 77%-e ili ne tuŝis tiujn taskerojn. La lastajn taskerojn kun vortkolektado faris nur la pli organizitaj grupoj, verŝajne pro manko de tempo.

La tri unuaj taskoj de la taskofolio ekzamenis (krom kompreno kaj gramatika ĝusteco) **interkulturan kompetenton** lige al la esprimo de la dato, uzo de antaŭnomo kaj familia nomo kaj pri Esperanto, kiel artefarita lingvo.

*La nombro de la grupoj, kiuj skribis la daton*

ĝuste	pli-malpli ĝuste	malĝuste	neniel	itale
31	17	8	7	2

*La nombro de la grupoj, kiuj skribis la nomojn*

ĝuste	inverse
47	10

En unu grupo ili skribis nenion, en kvin nur la antaŭnomon kaj en du la antaŭnomon de la gepatroj aŭ de ĉiuj familianoj – do estas klare, ke ili ne komprenis la taskon.

Per la taskeroj pri Esperanto mi volis ripetigi al ili la esencon de nia projekto: ni lernis relative junan, logikan, utilan ktp. lingvon, kaj se ili vidos en aŭgusto la verdan amason de kongresanoj, kuraĝu almenaŭ eldiri *saluton!*. La respondoj estas interesaj ĉefe el ĝusteca vidpunkto, tamen, la uzitaj epitetoj montras ankaŭ la opinion de la lernantoj pri la lingvo.

*La nombro de la grupoj, laŭ kiuj Esperanto estas*

bela	facila	malfacila	interesa	internacia	eŭropa	komuna
16	17	3	2	7	2	2

La skriba kaj parola **komprena kompetento** estis esence grava dum la tuta testado. Ĝeneralan bildon montras tio, ke la proporcio de miskomprenitaj taskeroj el ĉiuj faritaj estas 7,6%.

Ciferigeblan rezulton povis doni la sekva tasko:

**Respondu.**

Jozefo rigardas foton. Petro demandas al li:

- Kiu estas sur la foto?
- Fratoni mi ne havas, sed tiu ĉi persono estas la filo de mia patro.

Kiu estas sur la foto? \_\_\_\_\_

Ĝuste respondis tri grupoj; 41 (63%) ne respondis; laŭ la aliaj videblas Petro (4 grupoj), la frato, fratino ktp. eĉ *il satiro danzante* [la dancanta satiruso, unu el la ĉefaj muzeaj allogaĵoj de *Mazara del Vallo*], kies bildon ili pensis malkovri sur la kongresa informilo... Verŝajne normala estas tiu rezulto, pro la manko de legaĵoj dum la kurso.

La **vorttrezoron** ekzamenis unu luda tasko (la grupanoj devis rekoni vortojn, kies literoj miksiĝis), unu tasko pri la ŝatokupoj kaj la lasta tasko de la testo, kiu tekstis jene:

**Skribu vortojn, la unua litero estu**

**b:** *bona*, \_\_\_\_\_

**l:** *longa*, \_\_\_\_\_

**p:** *patro*, \_\_\_\_\_

**m:** *muziko*, \_\_\_\_\_

La rezulton v. en la tabelo; ĝi montras, kiuj vortoj estis la plej popularaj. Inter la ŝatokupoj ili menciis tri verbojn kun komenclitero l: *lerni* (2), *legi* (3) kaj *ludi* (6) – estas strange, ke el la testfina listo mankas *ludi*. Aparte interesa estas la uzo de la afiksoj *-in-* kaj *mal-*, kio signifas la unuajn paŝojn en la krea aliro al Esperanto.

babili	10	leciono	1	palmo	1	majo	2	mateno	1
bakisto	1	legi	10	papago	1	<b>malalta</b>	4	mekanikisto	1
banano	3	leono	3	paroli	2	<b>malami</b>	1	melono	1
bebo	2	<b>lernanto</b>	10	pasko	1	<b>malbela</b>	3	merkredo	1
bela	15	<b>lernantino</b>	7	<b>patrino</b>	14	<b>malbona</b>	4	mil	2
besto	2	lerni	4	persono	3	<b>maldika</b>	4	ministro	2
blanka	12	letero	1	peza	3	<b>malfacila</b>	1	monato	3
blonda	1	li	1	piano	1	<b>malfeliĉa</b>	1	monstro	3
blua	10	libro	6	piro	1	<b>malgranda</b>	5	morgaŭ	1
bongusta	3	lingvo	4	plafono	1	<b>malinteresa</b>	2	muro	1
brava	1	loĝi	4	pluvo	1	<b>malinteligenta</b>	2	muso	1
bruna	9	loĝloko	1	poemeto	1	<b>maljuna</b>	1		
buso	1	Ludoviko	3	policisto	2	<b>malnova</b>	1		
buŝo	2	lundo	7	pomo	2	manĝi	2		
		luno	3	post	1	mapo	1		
				princino	3	mardo	4		
				printempo	1	maro	2		
				promeni	2	marto	2		

**Listigo de la vortoj kun diversaj komencliteroj**  
(la ciferoj montras, kiom da grupoj skribis la vorton)

La prezento de la analizo pri **gramatikaj eroj** (kaj ĉefe eraroj) superas la kadron de tiu ĉi artikolo. Estis ekzamenitaj precipe la ortografio kaj la ĝusta uzo de finaĵoj. Mi citu nur tiun respondon, kiu fariĝis la titolo de mia raporto. Por respondi la demandon *Kio estas Esperanto?* anstataŭ la atendita vorto *lingvo* unu el la grupoj trovis alian solvon: post longeta diskuto ili sukcesis interkonsenti kaj esperantigi la italan vorton *materia*→*materio*. Por tio ili bezonis iniciatemon, memfidon kaj konscion pri la substantiva finaĵo en Esperanto. Ĉu el tio povus rezulti solidaj bazoj por plua konstruado?

KOVÁCS Márta (Hungario)  
bdg.kovacs.marta@gmail.com

## Reta Edukada Konferenco – grava por ni!

Tiu reta konferenco estis lanĉita en 2007 kaj nun havas 11 000 membrojn; ja unuavice anglalingva (*Global Educational Conference – GEC*)<sup>2</sup>, ĝi bonvenigas partoprenon de multlingva komunumo. Tiu Tutmonda Eduka Konferenco (TEK) okazis inter la 12a kaj 17a de novembro 2012, tute enrete dum dudek kvar horoj ĉiutage. Ĝi estis surprize agrabla, ekscita kaj societema evento kun mirinda eblo renkontiĝi kun ne-jam-esperantistoj kiuj dividas iujn el niaj valoroj, motivoj kaj komprenoj.



La TEK-retejo klarigas, ke ĝi ĉestas kunlabora, monda komunuma iniciato engaĝanta studentojn, edukistojn kaj instancojn sur ĉiuj niveloj. Ĝi estas konceptita por promocii eduko-rilatajn ligojn ĉirkaŭ la globo, dum ĝi apogas kulturen konscion kaj rekonon de diverseco. La konferenco celas prezenti ideojn, ekzemplojn kaj projektojn pri konektado de edukistoj kaj klasĉambroj kun forta emfazo sur promociado de tutmonda konscio, kultivado de tutmonda kapablo kaj inspira agado por solvi problemojn de la reala mondo. Per ĉi tiu evento, la organizantoj esperas ke la partoprenantoj defios kaj sin mem kaj aliajn fariĝi pli aktivaj civitanoj de la mondo.<sup>7</sup>

La konferencaj prezentaĵoj okazas en virtualaj salonoj ekipitaj per kunlaborigiloj (*Blackboard Collaborate*) kun kapablo vidigi kaj aŭdigi lumbildajn prezentaĵojn (*PowerPoint*), dividi kaj kunuzi mapojn, afiŝojn kaj aliajn konvenajn ilojn kaj partopreni gvidatajn ret-ekskursojn („web-tour” en la angla). Tim MORLEY kaj mi havis nian porcion de komencaj obstakloj, inkluzive de nepopulara horasigno, sed nia prezentaĵo *Esperanto: La Unua Fremdlingvo por Tutglobaj Civitanoj* ankoraŭ videblas je <http://tinyurl.com/c3hutjf>.

Antaŭ, inter kaj post la prezentoj estis vigla kaj amikema komunumo en la ĉefa salono kaj en diversaj diskut-forumoj. Teamo de mirinde utilaj kaj paciencaj volontuloj laboris kuraĝe por helpi la partoprenantojn uzi

---

<sup>2</sup> Enirpaĝo de GEC: <http://www.globaleducationconference.com/>. Se vi volas ĝin legi en Esperanto, metu la supran adreson en la traduskatolon sur la paĝo [translate.google.com](http://translate.google.com), elektu traduki de „English” al Esperanto, klaku la tradukitan adreson kaj Guglo tradukos la tutan retejon. La procedo bezonos kelkajn minutojn.

nefamiliajn procedojn. Iom da helpo haveblis en lingvoj „alia ol la angla” aŭ la hispana; mi kredas ke nia komunumo povus bonvene helpi pli tiurilate.

La fondinto, Lucy GRAY substrekas: ’Kaj pedagogio kaj teknologio ludas signifan rolon en ĉi tiu okazaĵo, sed ĝi estas nek informteknologia konferenco nek ĝenerala eduka konferenco. Individuaj iloj kaj lernobjektaj temoj devus esti pritraktataj en la kadro de projektoj bazitaj sur kapabloj taŭgaj por la 21-a jarcento kaj iniciatoj kiuj prezentos tutmondajn eblojn konekti, kunlabori kaj agi. Nia spektantaro estis ĉefe K-20<sup>3</sup>-edukistoj, studentoj, organizoj kaj aliaj interesataj pri Tutmonda Edukado. La ĉefa lingvo de la konferenco estos la angla, sed anoncistoj estas forte kuraĝigitaj prezenti en siaj gepatraj lingvoj. Tradukoj ne estas eblaj en ĉi tiu punkto, sed ni esperas esplori ĉi tion en la estonteco.”

La tuta TEK-retejo povas esti tradukita en E-on aŭ aliajn lingvojn, helpe de Guglo kun postpoluro [vd la antaŭan piednoton - NdIR]. Tamen, mi ne sukcesis enregistri min en la Esperantan (kaj la francan) version de la paĝaro. Eble estis nur mia propra problemo ĉar alia partoprenantino diris, ke ŝia baratlingva versio funkcias bone.

Mi kredas ke estus bona ideo proponi ILEI-kunvenon en E-o, kiel parto de TEK 2013. Tio montrus, ke edukistoj ja parolas E-e por praktikaj celoj. Ĝi devus temi pri publika temo, kiu taŭgas por la partopreno de ajnlingvaj parolantoj, kvankam realisme estas malverŝajne, ke la kunveno estus ofte interrompata de la malmultaj scivolaj neesperantistaj spektantoj kiuj eble venus por vidi, ĉu E-o estas reala. La kunveno devus resti videbla monatojn antaŭ kaj jarojn post la evento, donante ateston, ke E-o apartenas al la tutmonda komunumo.

Se ni paŝos zorgeme, kaj aŭskultante kaj parolante, tiu ĉi komunumo povas helpi al Esperanto trovi pli grandan rolon en la ĉef-flua moderna mondo.



*Penny VOS (Aŭstralio)*

---

<sup>3</sup> K-20: lernantoj, kiuj estas minimume 4-5-jaraj kaj ne estas pli ol 20-jaraj. – NdIR

## Novaj planoj: ILEI estrarkunsidis en KAEST

Kunvenis la nova estraro de ILEI por plani projektojn por la sekvaj jaroj. Kvin el la naŭ estraranoj kunsidis tra du plenaj tagoj, skajpe kun alikontinentuloj. Post formalajtoj, la tuja temo estis la sekva Konferenco de ILEI, okazonta en Herzberg-Sieber en julio, 2013. Arangoj definitiviĝis, samkiel la konsisto de LKK kaj akcepto de buĝeto; aliĝilo kaj pliaj informoj aperas fine de la numero. Subtene al la konferenca temo ‘*Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj*’ okazos 90-minuta ateliero Planoj ekzistas por faciligi la konferencan partoprenon al ŝlosilaj agantoj el aliaj kontinentoj.



*De maldekstre: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Magdaléna FEIFIČOVÁ, Zsófia KÓRÓDY, Stefan MACGILL kaj Radojica PETROVIĆ*

Por la konferenco en 2014 venis pet-dokumento, la ĉeestantaj estraranoj principe akceptis la proponon, kondiĉe de la plenumo de formalajtoj. Ni proksimas al anonco pri la elektita urbo kaj lando. Imagoj pri 2015 kaj 2016 venis en diskuton. Sekvis vasta diskuto (cerbo-ŝtormado) pri agadplanoj, task-dividoj kaj prioritataj laborkampoj por la novestrara mandato. Estraranoj pretigos tri-jaran laborplanon por la periodo ekde la konferenco

en 2013 ĝis tiu en 2016. Malneton ricevos la komitato frue en 2013, cele al akcepto en Herzberg-Sieber. La diskuto formis valoran bazon por la pritrakto de la buĝeto 2013. Prioritataj projektoj estas jenaj:

- Konkretigo de skemo kaj postularo por modula programo de instruista trejnado prezentbla al *ALTE (Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo)*.
- Fortigo de eksteraj rilatoj kaj liga videbleco, ĉe *FIPLV*, *ALTE* kaj *Unesko*, prepare al la 60-jara jubileo de ĝia rezolucio en Montevideo.
- Plia laboro por permesi publikan lanĉon de la multlingva retejo.
- Daŭrigo de la regiona agado en Azio, Latinameriko kaj Afriko.
- Planoj altiri finanĉan subtenon de ekstermovadaj fontoj por projektoj.
- Kuraĝigo al homoj kaj organizoj pretigi dulingvajn fakajn tekstojn, por disponigi pli varian kursmaterialon al instruistoj kaj komputistoj
- Pli aktive apogi instruistojn per materialoj (filmoj, interaktivaj retejoj k.s.), per propraj iniciatoj kaj kunlaborado kun *edukado.net*, *lernu.net*, *mondeto.com* kaj aliaj.
- Avangardi en rilatoj inter ILEI kaj UEA, specife rilate al la *Strategia Vizio* kaj la *Laborplano*, kiu fontos el ĝi.
- Eldoni serion de dulingvaj varbiloj pri la eduka valoro de Esperanto.

En la dua tago skizo pri la buĝeto de ILEI por 2013 venis sub la lupeon; post kvarhora laborado rezultis plia retraktado, kiu pluiris al la nova kaj antaŭa kasistoj kaj al ekstereŭropaj estraranoj. Nia kasisto en posta tago skajpe benis ĝin. Ĝi iros decembre al la komitato por reta voĉdono. La sumo de la en- kaj el-spezoj altiĝis je ĉ. 20% kompare kun 2012, sed la planata defcito iom signife falis. Tio eblis dank' al milda bonigo de la membronombro, altigita disponigo de UEA por edukaj laboroj ĉe ILEI (de € 4200 ĝis € 6200) kaj pli intensa uzado de rimedoj el la kasoj de ILEI.

La estraro akceptis duon-frazan aldonon por la statuta punkto 7.2.3 pri devoj de sekcioj, kiu same iros al la komitato por reta voĉdono. Plia decido estis principa akcepto de reformo de la niveloj en la ekzamenoj de UEA/ILEI por adapti ilin por pluvivo paralele al la KER-ekzamenoj. Niĉo, kiun momente ne traktas la Esperanta KER, estas enirnivela ekzameno por uzo ĉefe en landoj sen enlandaj ekzamenoj. Tiu aldono permesas re prilaboron de la du nunaj niveloj, por ke ili estonte formu mezan kaj superan nivelojn. La ekvivalentaj KER-normoj estos A1/A2, B1/B2 kaj C1. Nomoj por la novaj niveloj restas diskutataj. Nia komitato ricevos fonan



dokumenton pri la propono, kiu ĉefe detalas la testotan enhavon de la nova unua nivelo. La Komitato estos petita aprobi la novan triŝtupan skemon principe – tiel ke laboro pluiru por redifini la pli altajn nivelojn. Testado de kulturaj konoj restos ĉiunivele. La demando urĝas, ĉar unua-nivela sesio estas planata por Senegalo komence de januaro 2013.

La kunsida protokolo liveros resumon pri pliaj diskutoj kaj decidoj. Tra la tagoj de *KAEST* la estraranoj plulaboris pare aŭ triope pri specifaj temoj.

La 15an de novembro ekis *KAEST (Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Teknologio)*, en kies malfermo ILEI inter aliaj salutis. Jen du frazoj el tiu saluto: „La temo de *KAEST* ‘Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj’ estas proksima al la koro de ILEI – tial ni grupe partoprenas kaj kontribuas. La temo enfokusigas la rilaton inter du organizoj: *E@I* scias liveri modernan lern-teknologion; egale gravas, ke ILEI liveru modernan pedagogian enhavon kaj aliron, kiu pli plene ekspluatu la novajn eblojn de la komputika epoko.”

ILEI okazigis komunan kunsidon de estraranoj de si kaj *ISAE (Internacia Scientia Asocio Esperantista)* por trovi temojn de komuna intereso. Tio okazis kun skajpa partopreno de la prezidanto de ISAE, José-Antonio VERGARA el Ĉilio kaj skajpskribe kun nia estraranino Arko en Ĉinio. Aparta protokolo detalas tiun kunsidon. Simila kunsido okazis kun la komputista organizo *E@I*. Kvin tagoj da intensa laborado, kun unuflanke vasta perspektiva debato, aliflanke konkretaj decidoj kaj atingoj.

*La kunvenintaj estraranoj de ILEI*

## **El somera E-ujo: Metodika kaj interkultura spertiĝo**

Post streĉa kaj malfacila lernoĵaro mi intencis plene ripozi. Mi ricevis aldonan libertempon, do mi decidis partopreni SES en Slovakio kaj la Italian Kongreson de E-o en Mazaradelfo. Mi rezignis la konferencon de ILEI, tamen mi ne nur bone ripozis, sed ankaŭ pliriĉigis miajn pedagogiajn spertojn, kaj tion mi volonte dividis kun vi.

Julie, dum la *Somera Esperanto-Studado (SES)* en Nitra, mi deziris nur iom rigardi la trejnseminaron *Flugiloj de Malfacila Vento*, sed subite mi finis ĝin, eĉ kiel unua gvidis la provlecionon. La stilo de la seminario gvidata de

Xosé CONDE kaj la proponita maniero de instruado estis por mi vere allogaj. [Sur la foto li videblas kun la aŭtorino de tiu ĉi artikolo – NdLR].

Bedaŭrinde mankis tempo, sed ni – la partoprenantoj – havis ŝancon ekscii multon pri metodiko de instruado (profesie kaj interese, kun multaj praktikaj ekzemploj, klarigoj kiamaniere eviti erarojn), observi lecionojn de diversaj spertaj instruistoj kun variaj metodoj de instruado, krome prepari kaj gvidi lecionon kun realaj lernantoj – komencantoj. La gramatika parto de *Flugiloj*, gvidata de alia fakulo, estis prezentita sur alta nivelo de prilingva kompetento, tamen pedagogia pritrakto



de gramatikaj specifaĵoj de E-o meritas plian atenton. Mi pli precize komprenis, kion mi delonge sentis: E-ujo bezonas bonajn kaj metodike kompetentajn instruistojn, kiuj uzas allogajn, viglajn, taŭgajn por konkreta situacio manierojn de instruado kaj kiuj ne forgesas, ke E-o estas pli ol lingvo. Kiam ni jam havos sufiĉan kvanton, tiam ni povos pensi pri enkonduko de E-o kiel dua lingvo en lernejojn. En Pollando vere grandajn edukajn problemojn havas instruistoj de la angla lingvo kaj katekizado – certe ili posedas la scion, sed gravas scipovi „bone vendi” ĝin.

Ĝenerale mi estis ravita pri la tuta SES. Partoprenis ĝin pli ol 220 diversaĝaj personoj; neniu devigis iun uzi nur E-on, eĉ dum la unuaj 5 tagoj ĉiuj gravaj informoj estis tradukataj al la angla, sed iom post iom ĉiuj iris al „nia” lingvo! Tuj post la alveno estis „forte rekomendite” al ĉiu fari teston por baldaŭ ricevi proponon de kurso por konvena lingvonivelo. Dum mia 22-jara E-umado verŝajne SES estis la unusola aranĝo, dum kiu komencantoj ne perdiĝadis, eternaj komencantoj progresis kaj decidis lerni. En SES mi ne ŝatis unu momenton: la pantomimon de E-a himno dum la fermo de la eduka aranĝo. Eble por parto de la publiko estis amuze, eble por kelkaj ĝi faciligis parkerigi la vortojn (kio ja ne bonfamas), sed plej granda parto de ĉeestantoj (i.a. mi) ne sciis ĉu ekstari, aŭ ridegi? Dum posta diskuto mi demandis: *ĉu vi farus samon kun via nacia himno?* Pro tio estus grave ankaŭ pli bone pripensi, kiamaniere reklami E-on. En tiu momento

mi pensas pri postSESaj fotoj i.a. en la *Vizaĝlibro* de la samaj knabinoj vestintaj sin verŝajne nur per ŝtofo kun vorto *ESPERANTO*.

Konfirmo de miaj opinioj estis la seminario *Sed homoj kun homoj*, kiun mi partoprenis danke al la projekto *Grundtvig* en la Itala Kongreso en Mazaradelvalo. Neniam ni partoprenis prelegon de Kristin TYTGAT, ĉar ŝi ne prelegis, nur provokis nin mem diskuti kaj interŝanĝi spertojn de diversaj naciecoj. Ni provis precizigi la signifon de vortoj: eksterlandano, *fremdulo*, kune eltrovi rimedojn de komunikiĝo. Konkludo: Ni, e-istoj havas la saman lingvon, sed devenas de diversaj kulturoj, kiujn dum la seminario ni lernis estimi. En aparta tempo ni ekzercis interkulturan komunikadon gvide de Elizabeth SCHWARZER, partoprenis prelegojn, teatraĵojn ĝis 1.00 nokte – ne por ricevi la subvencion, sed kun profunda intereso. Krom la „nia”, okazis ankaŭ seminarioj: *Muziko – internacia lingvo* gvidata de *Kajto* kaj *Metodika trejnkurso por lingvoinstruado* de Katalin KOVÁTS, sed mi bedaŭrinde ne sukcesis sperti ilin. Interese estas, ke en la urbo kun influo de diversaj kulturoj la urbestro havas grandan intereson pri Esperanto, eĉ jam okazis kursoj de la lingvo por junuloj kaj spertuloj. Bedaŭrinde el „la lokuloj” aperis nur kelkaj kaj tiuj ne scipovis respondi eĉ facilan demandon dum la enmanigo de diplomoj. Ni esperu, ke post la Itala Kongreso ili progresos danke al sekvaj kursoj.

Resume, post SES mi volis sunbruniĝi ĝuante la etoson de la Itala Kongreso en Sicilio, sed mi ricevis subvencion de *Grundtvig* kaj partoprenis la seminarion de *Sed homoj kun homoj*; krome prelegis i.a. Davide ASTORI, Aleksander MELNIKOV, do mi restis sufiĉe pala kaj ege kontenta. La ferioj pasis, mi denove laboras, sed jam komencas pensi pri la somero 2013: mi volonte partoprenus la konferencon de ILEI en Herzberg, kaj denove SES. Espereble ili ne okazos ambaŭ en la sama semajno antaŭ UK.

*Grażyna SZUBRYCZYŃSKA (Pollando)*

## **Esperanto en universitata konferenco**

La 125-a datreveno de la kreado de Esperanto estas tre grava por esperantistoj. Ni solene festas dum la tuta 2012a jaro la eldonon de la unua lernolibro de Esperanto, skribita kaj eldonita de Ludoviko Lazaro Zamenhof, iniciatinto de la lingvo en 1887-a j. Tiuokaze, la Pola Sekcio de

ILEI preparis ekspozicion sub la titolo „E-o kaj ĝia kreinto en la 125-a datreveno de la kreado de la internacia lingvo”. La ekspozicio estis jam prezentita dum la 27-aj E-aj Tagoj de Krakovo, kiuj okazis inter la 1-a kaj la 3-a de junio en la krakova kulturdomo Podgórze kaj ankoraŭ kelkajn tagojn post la aranĝo. La 26-an de oktobro 2012, la ekspozicio akompanis sciencon konferencon pri instruado de fremdaj lingvoj en la *Pontifika Universitato Johano Paŭlo la Dua* en Krakovo.



La konferenco, kies temo estis „Individuigo de edukprocedoj de fremdaj lingvoj – sciencaj esploroj kaj praktiko”, estis organizita de la Interfaka Departemento de Fremdaj Lingvoj de la Universitato. En la aranĝo partoprenis ĉirkaŭ 50 lingvoinstruistoj, lingvistoj kaj sciencistoj el diversaj krakovaj kaj aliaj polaj altlernejoj. Estis eĉ unu prelegantino el Ukrainio. Oni havis okazon aŭskulti preskaŭ 30 prelegojn pri diversaj aspektoj de la instruado de fremdaj lingvoj.

La enkondukon al la ekspozicio gvidis Magdalena TATARA dum sia interesa prelego [vd la *foton maldekstre* – *NdlR*]. La estraranino de ILEI-Pollando kaj lektorino pri la franca lingvo en la *Pontifika Universitato Johano Paŭlo la Dua*, preparolis la enhavon de la ekspozicio kaj prezentis la vivon kaj agadon de nia majstro Ludoviko Zamenhof. La ekspozicio estis preparita pollingve por ebligi ekkonon de E-o al la neesperantista publiko. La ekspozicio prezentis silueton kaj la vivon de la kreinto de E-o, la historion de la kreado de la internacia lingvo, priskribis la gramatikon kaj vortfaradon kaj prezentis la plej konatajn e-istojn. Krom ekspoziciaj afiŝoj oni povis ankaŭ rigardi ekzemplojn de lernolibroj, revuoj, literaturo kaj KD-diskoj en la internacia lingvo. Ni volis prezenti al ĉiuj la lingvon kaj la E-movadon kaj montri, ke E-o vivas, disvolviĝas kaj efike helpas komuniki, konatiĝi kaj amikiĝi.

*Gizela SKLORZ – estrarano de la Pola Sekcio de ILEI*

## **Tago de la Instruistoj ĉe UNESKO**

*la 5-an de oktobro 2012*

Mi ne povis ĉeesti matene ĉar mi vojaĝis al Parizo. La posttagmeza temo estis „Plibonigi la statuson de instruistoj”. La rajtoj kaj respondecoj de instruistoj, salajroj kaj la trafo (konsekvencoj) de tiuj faktoroj en la bildiĝo de la instruistoj en la socio. Kiu estas la plej bonaj manieroj por altiri la plej bonajn studentojn kaj reteni la plej bonajn instruistojn en la profesio?

John BANGS el la Universitato de Cambrige (GB) insistis pri la kohera sistemo kaj bona integriĝo de la instruistoj, pri konsidero de la lastaj malkovroj de la esplorado rilate al instruado kaj pri la graveco de la signifo de la lernejo por infanoj. (Iri al la lernejo plej ofte signifas esti kun geamikoj.) Alta efikeco de la instruistoj estas esenca, BANGS emfazis la neceson de mem-efikeco de instruistoj. Li citis COVEY: „Motivado estas ena fajro. Se iu alia provas lumigi ĝin sub vi, ne estas ŝanco ke ĝi brulos tre longe”. Same gravas bona partnerado kun la sindikatoj. Li insistis pri la rolo de la lernejestro, kiu devas plej efike kunlabori kun la instruistoj. Tünde KOVÁCS-CEROVIĆ el la Universitato de Belgrado parolis pri la profesio kiu modelas la homaron, instruistoj aktive partoprenas en la

miraklo de la homa vivo, pligrandiĝo de la homo kaj ties evoluado. Sed ili devas esti atentemaj pri la evoluado de la futuro, kvankam ili ne havas informojn rilate tiun estontecon! Malfacile estas instrui kiam estas tiom da kontraŭdiroj, kompleksoj, burokratika sistemo. Infanoj ne kapablos pripensi per si mem se la instruistoj devas nur obei kaj agi kiel oni devigas ilin. Inter la solvoj gravas pliboniĝo de la rilatoj inter lernantoj, instruistoj, lernejestroj, inspektoroj, gepatroj kaj politikaj respondeculoj sur ĉiuj niveloj, de la komunumo ĝis la registaro.

Sofialeticia MORALES GARZA, teama ĉefo en Sano-Promocio kaj Sociaj determinantoj, PAHO (Meksiko) – mi maltrafis tiun prezentadon.

Aniceto SOBREPEÑA, Prezidanto de la Metrobank Foundation en la Filipinoj, estas la forta impulsanto de la Monato de la instruistoj, apud la Ministerio de Edukado. Lia Fondaĵo estas la fonto de multaj aliaj novigoj por plibonigi la aliron al edukado kaj la kvaliton de instruado. Gravis la prelego de Ron THORPE, li insistis pri la profesiigo de la instruistoj. Dum la paŭzo mi alparolis junulinon, malkovris ke ŝi lernas E-on pere de la reto kaj ŝi levis la problemon de kontaktoj: kun kiu paroli kiam oni scias nenion pri la asocio? Povus esti interese, ke la korektantoj informu pri Esperantaj kunvenoj en la urbo, kie loĝas la lernanto, ke li/ŝi indiku pri filmoj, rakontoj, radioelsendoj...

*Raportis: Monique ARNAUD (Francio)*

## **Sud-Afriko: 125 jaroj de Esperanto**

*La E-movado en Kaburbo (Cape Town, Sud-Afriko) fokusiĝis ĉi-jare al la agado rilate al la 125-jariĝo de Esperanto, kiu konsistis el: E-Instruado, E-filmo, laboro de sekcioj: junulara kaj de ILEI, interkultura lingvoagado kaj turisma agado.*

**La E-instruado** estas la ĉefa celo de Kaburba E-Klubo. Tiel la E-komunumo pli kaj pli radikiĝas en la urbo. Pluiris en bona ordo la kursoj kun progresantoj. Kvar sudafricaninoj varbis novajn tri junulinojn kaj du junulojn. La instruado okazis laŭ la tradicia metodo kun libroj por francparolantoj (ekzemple la *Racia Kurso de Esperanto / Cours Rationnel*

*d'Espéranto* donacitaj de SAT-Amikaro), anglaparolantoj (libroj senditaj de la dana samideanino Betty CHATTERJEE) kaj parolantoj de la afrikansa (*Esperanto: Die Internasionale taal*, eldonita de la E-Asocio de Suda Afriko, donacitaj de s-ro Oskaro SHER). La senpagan kurson gvidis ĝis septembro s-ro Emile MALANDA.



*Surfote: Emile MALANDA kun la japanaj geedzoj en Kaburbo*

**Junulara E-Sekcio** bone funkcias en Kaburbo, kunlabore kun la respondeculo de TEJO en Afriko, Jérémie SABİYUMVA el Burundo, kaj gvidita ĉi-jare de kuraĝa junulo Shem KABANZA. La sekcio riĉiĝis je du sudafrikaj knabinoj. Shem trejniĝas kaj perfektigas sian E-scion helpe de Emile, kiu preparas lin transpreni estonte la taskon instrui E-on. Apogo per financaj kaj materiaj rimedoj estas granda bezono por pli sukcese propagandi la Internacian Lingvon inter la gejunuloj. Notindas, ke la E-klubo neniam estis subvenciita.

**Survoje al ILEI-sekcio:** Post la unuaj iniciatoj de Emile MALANDA, Radojica PETROVIĆ kaj Renato CORSETTI, kiujn sekvis ankaŭ la ĝenerala sekretario de *EASA*, profesoro d-ro Harro VON BLOTTNITZ, daŭrigis interŝanĝon inter Emile kaj Mirejo GROSJEAN por fondi la Sudafrikan Sekcion de ILEI. Ĝia prezidanto estas aktiva esperantisto de Durbano, s-ro Elisée BYELONGO. Sekretarias Emile MALANDA. Laŭplane okazos en decembro 2012 la unua laborkunsido de ĝiaj membroj en Durbano. Tuj poste ekos oficialaj kontaktoj kun ILEI por akcepto de la sekcio.

**Agadoj interkulturaj, Filmaj kaj turismaj:** La *Interkultura Centro pri Vivantaj Lingvoj (Intercultural Center of Living Languages / Centre Interculturel des Langues Vivantes*, kun retpaĝaro [www.icll.co.za](http://www.icll.co.za)) estas senprofita organizo, en kiu ĉefe tri lingvoj estas instruataj: E-o, la franca kaj la angla. Libro en kaj pri E-o, en la franca kaj angla estas bonvenaj por la starigo de trilingva biblioteko. La *Fondaĵo Randall D. Christians*, Kaburbo, jam disponigis centon da novaj anglaj libroj. Kontaktadreso: [icllnpo@gmail.com](mailto:icllnpo@gmail.com).

Nia klubo en Kaburbo partoprenis per du E-filmetoj en la konkurso kiun lanĉis la Germana E-Asocio okaze de la 125-jariĝo de Esperanto. La unua, titolita *Turisto en Kabo*, montras eksterlandan turiston kiu unuafoje venas al Sud-Afriko kaj konas nur la francan lingvon kaj E-on. Ĉe la flughaveno li ne sukcesas komunikiĝi per la franca por akiri helpon, sed ekvidas iom fore homon kun E-ĉemizo, alkuras lin kaj ricevas la bezonatan helpon. La dua filmeto, *La Lingvo de la Homaro*, rilatas al 'babelismo', t.e neeblo de popoloj interkomunikiĝi se ĉiu uzas sian nacian lingvon por saluti en la grupo. Post lernado de E-o ili ĉiuj parolas kaj salutas per tiu ĉi komuna lingvo. La jaro 2012 estis markita de riĉaj agadoj pri turismo. Kaburbon kaj ĝiajn vidindaĵojn vizitis esperantistoj polaj, britaj kaj japanaj.

*Emile MALANDA*

## **Pri „Esperanta Retradio” (ERR)**

Ni ĉiuj rememoras la grandan bedaŭron, kun kiu antaŭ kelkaj jaroj ni ricevis la novaĵon, ke oni ĉesigas la E-ajn elsendojn de Pola Radio. Nun ni povas fieri pri kelkaj relative novaj E-aj radiostacioj en la mondo. Do, nun



ni havas la okazon esprimi nian kontenton minimume tiom vigle, kiel ni esprimis nian malkontenton kelkajn jarojn antaŭe. Mi proponas do, ke ni esprimu nian kontenton aŭskultante kiom eble plej multajn radioprogramerojn, partoprenante en la diskutforumoj pri tiuj kaj kontribuante per niaj propraj materialoj al la riĉeco kaj diverseco de tiuj programeroj.

Ĉar E-on oni akiras plej ofte per memlernado, radioaŭskultado estas gravega ŝtupo por plibonigi nian komprenkapablon. Ĉi tie mi parolos pri la radio-elsendejo „*Esperanta Retradio*” (ERR), kiu estas aparte taŭga por didaktikaj celoj, ĉar la ĉiutagaj sonaĵoj estas mallongaj, klare laŭtlegetaj en klara E-o kaj akompanataj de la koncernaj skribitaj tekstoj.

Ofte fotoj, desegnaĵoj aŭ filmetoj aldoniĝas al la prezentado de tre interesaj kaj aktualaj temoj. Aŭskultantoj havas la eblon fari demandojn aŭ komentojn en la diskutejo de ĉiu paĝo.

Jen la adreso de EER: <http://members.aon.at/aldone/retradio/>

Atentu: kiam vi volos aŭskulti sonaĵon, vi ricevos surekranan ŝildon informantan ke: „Tiu ĉi enhavo ne videblas en kadro”. Bonvolu alklaki sur la sama ŝildo la subajn vortojn: „Malfermu novan fenestron”.

En la arkivo de la paĝaro vi povas elekti diverstipajn materialojn. Mi aparte rekomendas al instruistoj la materialon de Andrzej BACH „Ni loĝas en la Triurbo”, je la 19a de majo 2012. Temas pri programero prezentita de pola grupo – tre imitinda iniciato! Se ĉiu instruisto preparus ĉiumonate tian malgrandan materialon laŭtlegetan de kelkaj kursanoj, la diverseco kaj la riĉeco de Esperanta Retradio kreskus rapidege! Ankaŭ la lecionoj de la koncernaj instruistoj iĝus pri logaj kaj efikaj.

Gratulon kaj dankon al Anton OBERNDORFER, la estro de ERR, kiu de pli ol unu jaro kaj duono sukcesas elsendi ĉiutage freŝan interesan kaj agrablan sonaĵon. En la komenco, li laboris preskaŭ tute sola. Poste aldoniĝis, unu post la alia, volontuloj, kiuj formis malgrandan teamon: Andrzej BACH, Paŭlo Sergio VIANA kaj Gian-Piero SAVIO.

Ekde majo ĉi-jare, ankaŭ mi komencis partopreni en tiu ĉi agrabla laboro. Ju pli multaj personoj kontribuos al ERR, des pli interesa kaj bunta ĝi fariĝos. Do... ni atendas viajn komentojn, sugestojn kaj kunlaboraĵojn.

*Luiza CAROL (Israelo)*

## Raporto pri ES-FESTO

Inter la 26-a kaj la 28-a de oktobro 2012 mi partoprenis en la unua universitata E-a festo de la E-fakmanaĝeroj en la universitato de Szeged (HU)<sup>4</sup>. Mi tre antaŭĝojis pri tiu aranĝo, ĉar ankaŭ mi finis mian studadon ĉi tie kaj mi jam organizis similan programon, do mi estis scivola pri la novuloj kaj pri la nova programo. Post la ŝtatekzameno mi ne povis paroli E-e, tial ĝi estis tre bona eblo por ekzerci min. Mi aparte ĝojis, ke ĉi tie estas ĉirkaŭ 30 vizitantoj, ankaŭ el eksterlando (ekz. el Ĉeĥio, Pollando, Germanio kaj Kazahio) kaj finfine mi povis uzi la lingvon en internacia komunikado.



---

<sup>4</sup> ILEI aktive partoprenis la eventon, krome ni donacis revuojn kaj librojn al la universitata grupo kaj la urba biblioteko. – NDIR


La programo komenciĝis vendrede vespere per la prezento de la fako kaj la interkona ludo, per tio ni ekkonis unu la alian. Sabate ni vizitis la 50-jaran E-kolektaĵon de la *Biblioteko Somogyi* kaj ni povis partopreni en muzea gvidado de la ekspozicio Munkácsy en la *Muzeo Ferenc Móra*. Post la vizitado de ĉi tiuj, sekvis urba ludo kaj tagmanĝpaŭzo. Posttagmeze ni aŭdis interesan prelegon de Ruslan MAVLJUDOV pri Kazahio, de Veronika POÓR pri la funkciado de la Muzaiko kaj de Dorota RODZIANKO pri la projekto de E@I. Ĉiuj prelegoj estis interagaj kaj enhavis multajn novajn informojn. Kompreneble la prelegoj estis tradukitaj al la hungara por la novaj esperantistoj. Fine okazis kvizo, konversacio kaj poste, dum gitarludo, estis bonetosa vingustumado. La lastan tagon la gastoj ekkonis la belegajn famaĵojn de „la urbo de la sunlumo” kaj la programo finiĝis tagmeze en la dolĉaĵejo Acapella.

Mi fartis tre bone, ĉar la organizado estis atentema, la programoj estis buntaj kaj interesaj kaj dum la tuta semajnfino regis amika kaj agrabla etoso. Mi gratulas la gestudentojn, la ĉeforganizantinon, Zsófia PATAKI, kaj kompreneble la instruistojn de la universitato pro la bonega iniciato. Mi estas certa, ke mi partoprenos ankaŭ dum la sekvontaj festoj!

*Anett TÓTH-DEME (Hungario)*

## Ni funebras

### Li Shijun (Ĉinio)



En la 10a de novembro forpasis en la aĝo de 87 jaroj en Ĉinio, s-ro Li Shijun (plumnomo Laŭlum). Li fariĝis Honora Membro de ILEI en la julia Konferenco de la Ligo, en Kunmingo, rekone al vivo dediĉita (interalie) al edukado kaj antaŭenigo de la instruado de E-o.

S-ro Li naskiĝis en 1923, lernis E-on en 1939, laboris kiel instruisto de la lingvoj ĉina, angla kaj E-o en mezaj kaj superaj lernejoj; ĵurnalisto, tradukisto, vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, *La*

*Mondo* kaj Ĉina E-Eldonejo, estro de Ĉina E-Instituto, membro de la Akademio de E-o, honora membro de UEA, honora prezidanto de Pekina E-Asocio kaj honora komitatano de Ĉina E-Ligo. Lia fekunda verka kariero estos omaĝita vaste tra la movado, sufiĉas noti ke li tradukis plurajn elstarajn romanojn, epopeon kaj dramojn, kaj mem verkis centojn da poemoj, noveloj, fabloj, eseoj kaj recenzoj, kiuj aperis en gazetoj en- kaj ekster-landaj.

Li gvidis diversajn E-ajn kursojn por komencantoj aŭ instruistoj kaj verkis aŭ kompilis diversajn lernolibrojn de E-o, inter kiuj: Lernolibro de Esperanto (1949), Nova Vortaro Esperanto-Ĉina (kune kun aliaj 1959), Esperanta Konversacio (1964), Unua Ŝtupo de Esperanto (1983), Esperanto-Kurso por Memlernado (1984), Nova Kurso de Esperanto (1986), Esperanta Antologio (kune kun aliaj, 1988), Esperanto-Ĉina Vortaro (kune kun aliaj, 1990), 222 Simplaj Versaĵoj por Komencantoj (1994), Pri la Traduka Arto de Esperanto (kurso 1997), Cent Jaroj de Esperanto en Ĉinio (kune kun aliaj, 1999) kaj 250 Rakontoj pri Afanti (en versoj). Li kompilis Gvidlibron de Esperanta Konversacio (2001), Esperantan Vortareton por Lernantoj (parte aperintan en La Movado, 2002-2003), ilustritan per preskaŭ 4000 versaĵoj por helpi al la lernantoj kaj lernolibrojn pri la traduka arto kaj literaturo de Esperanto.

ILEI etendas sincerajn kondolencojn al lia familio kaj al la esperantistoj en Ĉinio kaj al nia propra ĉina ILEI-sekcio.

*Stefan MACGILL, Prezidanto de ILEI*

### **Vasil PISTOLI (Albanio)**

La 28-an de oktobro 2012, alvenis el Nov-Jorko la malĝojiga novaĵo pri la forpaso de sinjoro Vasil PISTOLI, eminenta albana e-isto, kiu notinde kontribudis al la disvastigado de la internacia lingvo en nia lando. Li venis el la albana urbo Struga kaj poste instaliĝis en Shkodër. Vasil studis en Bulgario pri konstru-inĝenierio, longan tempon deĵoris en la Ministrejo pri Konstruado kaj poste instruis en la Universitato de Tirana. Tie li subtenis sian kolegon Ĉefo FICO por starigi virtualan



E-klubon kiu celis anstataŭi tiutempe e-istan asocion enlande, en la kondiĉoj de totalisma reĝimo kiu ne permesis „nedekretitajn”, ne „kompartiemajn” asociojn. Tiel E-o komencis disvastiĝadi en la universitato kaj ekster ĝi per kursoj senpagaj kaj broŝuroj simplaj.

Ĉekape de la Albana Esperantista Ligo kaj poste direktoro de la Albana E-Instituto, profesoro PISTOLI sin montris aktiva en la kursogvidado, lernolibra kaj metodika kompilado por albanoj, en tradukado de libroj, en propagando de la e-ista movado mem per la gazetaro kaj elektronika medio, en renkontiĝoj kun fremdaj e-istoj. La jaro 1993 notis la starigon de amasaj lernokursoj de E-o, komence en universitato, en la Fakultato de Historio kaj Filologio, kie je la finiĝo de la kurso ekzameniĝis 22 gestudentoj, poste en la Tutnacia Mezlernejo de Fremdlingvoj kaj Pedagogia Mezlernejo en Tirana, en aliaj mezlernejoj kaj elementaj lernejoj en Tirana kaj en la distriktoj. Estas jam ĉirkaŭ 500 gestudentoj, kiuj ekzameniĝis kaj ricevis la konfirmon de profesoro Vasil PISTOLI per signo sur sia certigilo akirita pri la elementa nivelo de E-o .La lastajn jarojn, profesoro Vasil estis laboranta por finkompili la grandan vortaron albana-Esperantan, kiu pliriĉigos la trezoron de la vortaroj enmonde kaj helpos notinde al la enlanda esperantista movado. Post la jaro 1997 lia instituto entreprenis projekton: venigon de dekoj da albanaj gestudentoj al Internacia Studumo en Bydgoszcz, Pollando, pri Turismo kaj Internacia Kulturo, uzanta kiel laborlingvon ankaŭ E-on. Nun pli ol 20 el ili estas jam bakalaŭriĝintaj kaj eĉ du ankaŭ magistrigitaj de Internacia Akademio de Sciencoj de San Marino kun kiu tiu Studumo kaj nia Instituto kunlaboras. Sendube, tiuj ĉi studentoj estos la venontaj aktivuloj de la movado en Albanio, certe sur pli alta kultura nivelo, ol tiu de la maljuna generacio kiu tamen aŭdacis kaj oferis elspezante sian libertempon por tiel nobla idealo kia ja estas la esperantista idealo.

*Laŭ komuniko de Bardhyl SELIMI, sekretario de la Albana E-Instituto*

### **Dori VALLON-WHEELER (Usono)**

Ni tre bedaŭras raporti, ke Dori WHEELER, membro de AAIE ekde 1986, mortis la 2-an de novembro 2012 en Millbrae, Kalifornio. Ŝi estis 86-jaraĝa. En junio 1991 ŝi iĝis dumviva membro de AAIE kaj ofte poste faris monajn donacojn. Ŝi subtenis ankaŭ aliajn E-organizaĵojn kaj projektojn. Ekzemple laŭ la filmfaranto Simono KEITH, ŝi kontribuis finance al la




produkto de la unua animacia filmo (trukfilmo) en Esperanto, „Ĉapeloj”, en 2010. Ŝi estis ankaŭ dumviva membro de Esperanto-USA. Ŝi verkis poemojn en E-o, inkluzive “La Kialo Estas”, kiu aperis en Esperanta Antologio – Poemoj 1887-1981. Ekster Esperantio, Dori estis dum multaj jaroj profesia instruisto. Ŝi instruis infanojn en elementa lernejo apud San Francisco kaj de septembro 1989 ĝis marto 1990 ŝi instruis la anglan en Ĉinio. Dori ofte ĉeestis E-aranĝojn, kaj aparte rimarkinde ŝi partoprenis en ĉiu Nord-Amerika Somera Kursaro de E-o (NASK) de 1969 ĝis 2010. En sia antaŭlasta NASK en 2009, 40 jarojn post la unua, ŝi estis agnoskita kiel la plej longdaŭra partoprenantino. Ŝi lastfoje ĉeestis la landan kongreson de Esperanto-USA en Emeryville en 2011. Ni, kiuj konis ŝin, ĉiam memoros ŝian grandan rideton kaj oftan ridon, kaj ni forte sentos ŝian mankon.

(Fonto: <http://www.aaie.us/>)

## **János KIRSCH (Hungario)**

Post longa malsano forpasis la 22an de majo 2012 hungara esperantisto, diplomita instruisto de Esperanto, patro de 6 infanoj, en kies familia vivo ankaŭ E-o havis gravan rolon. Johano KIRSCH naskiĝis en 1961 en Mezötúr, hungara provinca urbo. Lia patro estis terkultivisto kaj la patrino okupiĝis pri la eduko de iliaj kvar infanoj. Post la studoj en la elementa lernejo Johano frekventis la mezlernejon de Piaristoj en Kecskemét, laboris kiel instruisto de teologio, pri kio sian diplomon li akiris post studoj en Eger kaj Budapeŝto. Li estis fervora e-isto kaj studis en la esperantologia fakoj de la Pedagogia Altlernejo de Szombathely, sub la gvidado de Katalin KOVÁTS (inter 1991-1994) kaj diplomiĝis kiel instruisto pri E-o.



Johano kiel preĝeja direktoro, mezlerneja instruisto kun sia edzino Ágota ROJK (teologo kaj pedagogo), same e-isto, vivis kaj agadis en diversaj urboj de la departemento Tolna. Ili havis 6 infanojn, kun kiuj ili ankaŭ enfamilie uzis E-on. Johano estis ankaŭ poeto. Li publikigis en pluraj antologioj, speciale pensigaj estis liaj meditadaj artikoloj. Johano KIRSCH kun sia familio partoprenis plurajn Renkontiĝojn de E-Familioj (REF), instruis E-on, organizis renkontiĝojn, laŭbezone predikis ankaŭ en E-o. Li konsideris sin „Ŝtatano duobla: kaj de la tera kaj de l' ĉiela patrio”.

Ni ĉiuj konservu en nia memoro lian karan personecon, liajn saĝajn vortojn kaj malferman koron por ĉio kaj ĉiu homa. Ripozu en paco, kara Johano.

*Katalin KOVÁTS (Fonto: edukado.net)*

## El la landoj kaj sekcioj

### Benino

Okazis en Kotonuo la 3an de novembro prelego pri *125 jaroj da justa komunikado per la internacia lingvo E-o* en la centro CODIAM en Kotonuo, Benino. Partoprenis ĉ. 80 personoj. Prelegis Mireille GROSJEAN. Okazis preparkurso al la ekzamensio de Internaciaj Ekzamenoj de ILEI-UEA kun 15 partoprenantoj, kaj kurso *Unua Kontakto* kun 26 partoprenantoj en la kulturcentro JoCa en Kotonuo. Okazis sesio pri la nivelo *Unua Kontakto* kun 25 sukcesantoj, sesio pri elementa nivelo kun unu sukcesanto kaj sesio pri meza nivelo kun du sukcesantoj. La tuta organizado estis en la manoj de *Scio Sen Bariloj*, kies prezidanto estas Privas TCHIKPE el Kotonuo, Benino. Tiuj agadoj eblis danke al la subteno de ILEI, de la Fondaĵo Esperanto Internacia, de la Rodanalpa Federacio en Francio kaj de diversaj mecena-



toj el la tuta mondo (vd *Scio Sen Bariloj* en *eo.wikipedia.org.*) Ni danku al ili. La ĉeesto kaj kunlaboro de Adjé ADJÉVI el Togolando, kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA kaj de Latifou GBADAMASSI, prezidanto de *Asocio de Beninaj E-istoj*, Landa Asocio de UEA, estis aparte fruktodona. [Surfote, de maldekstre: Adjé Adjévi, Privas Tchikpe kaj M. Grosjean].

Mirejo GROSJEAN

## Brazilo

### Finiĝis baza E-Kurso en la urbo Maceió, Ŝtato Alagoas, Brazilo

La 30-an de oktobro 2012, dudek unu kursfinintoj ricevis atestilojn pri partopreno en baza E-kurso gvidita de la kuba instruisto Gonzalo COLLANTES GARCIA [vd *la foton sube* – *NdlR*]. La kurso okazis de la unua ĝis la 30-a de oktobro 2012, de la 19-a ĝis la 21-a horo, de lundo ĝis vendredo, en la *Centro de Ciências e Tecnologia da Educação (CECITE)*, apartenanta al la *Edukejo CEPA (Centro Educacional de Pesquisas Aplicadas) – Farol – Maceió* – (Alagoas, Brazilo).

Entute estis 20 lecionoj laŭ miksa metodo. Gonzalo uzas la lernolibron *Sabe Usted Esperanto?* kun modifoj (portugalaj tekstoj anstataŭ la hispanaj). Kiel instruhelpilojn li uzas bildojn kaj desegnaĵojn por klarigi la gramatikaĵojn. Ĉiu leciono enhavas ekzercaron kaj li invitas la gelernantojn respondi buŝe kaj skribe al la demandaro.

Dum la festa ceremonio okazis prelegeto pri *Kion fari post la kurso?* fare de Aristóphio Andrade ALVES FILHO, la nuna sekretario de Alagoana Asocio de E-o. Post tio, Gonzalo faris mallongan paroladon gratulante la kursfinintojn. Ankaŭ Núbia Alves SOBRAL ANDRADE, la prezidantino de Alagoana Asocio de E-o, gratulis la gelernintojn kaj dankis al Gonzalo kaj al la mecenato, kiu venigas lin el Kubo kaj pagas ĉiujn kostojn. Fine, Gonzalo kaj Núbia enmanigis la atestojn kaj invitis ĉiujn regali sin per bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

De la 28-a de aŭgusto ĝis la 28-a de septembro 2012 Gonzalo gvidis alian bazan kurson ĉe la teknika lernejo *IFAL-Maceió (Instituto Federal de Alagoas)*





kun entute 10 gelernantoj, el kiuj 8 finis la kurson. Jam la sesan fojon Gonzalo vizitas nian urbon kaj gvidas bazajn E-kursojn (unufoje estis en 2004 dum la 39-a Brazila Kongreso de Esperanto, kaj en la jaroj 2006, 2007, 2009, 2010 kaj 2012). Organizis la kursojn: Alagoana Asocio de E-o en kunlaboro kun Kuba E-Asocio, kiu zorgas pri la burakrataj aferoj ĉe la ambasadorejo (vizo, invitilo k.a).

*Aristóphio Andrade ALVES FILHO*

## Ĉeĥio

### **La 1-a Internacia E-Lernejo (IEL)**

Allogis min la eblo dormi en kastelo – imagu, en kastelo! Kaj imagu, niajn sonĝojn gardis pli ol ducentjaraĝa platano acerfolia, kiu apartenas al la interes plej grandaj eŭropaj arboj de tiu ĉi specio. Ĝi altas 32 metrojn kaj la diametro de ĝia trunko en la alteco de 1,3 m estas 760 cm.

Same ravis min la familieca etoso de la aranĝo. De kiu? Ekde la 8-a ĝis la 11-a de novembro 2012, en la malgranda moravia vilaĝo Bartošovice (elp. Bartošovice) kun apenaŭ du miloj da enloĝantoj, okazis la 1-a Internacia E-Lernejo. Kvankam aliĝis 42 homoj el 8 landoj, fakte partoprenis nur 26 lernemuloj el tri landoj. Ene de ili estis 11 progresantoj, kiuj aŭ volis plifirmigi siajn lingvokononjn, aŭ spioni la instrudadon per rekta metodo. Inter la 15 komencantoj estis naŭ, kiuj neniam ĝis nun lernis Esperanton! Dum 12 instruhoroj la instruisto Stano MARČEK rektmetode sukcesis prezenti preskaŭ sian tutan lernolibron „Esperanto per la rekta metodo”, krom du ĉapitrojn el sia konversacia bildkurso. La loka bazlernejo havas tre spertan lernestrinon, kiu sukcesis ekipi sian lernejon per multimedia interaga tabulo, kaj ni ĝojis, ke ankaŭ ni rajtis ĝui tiun modernan teknikan ekipaĵon! Krome la patroprenantoj povis sekvi prelegon de li pri kurac-herboj kaj bekumadon fare de Magdaléna FEIFIČOVÁ. La kultura programo estis riĉa – belega voĉo de hungara kantistino Anjo Amika ravis ankaŭ la vilaĝestrinon, karaokeumado kun la slovaka rok-grupo Team, kiu siatempe prezentis siajn kantojn E-lingve dum kelkaj E-kongresoj, kantigis ĉiujn, kaj la lokaj lerneĵanoj en la solena malfermo surprizis nin per tri popolkantoj kantataj en senriproĉa E-o. La aranĝon retsalutis ankaŭ la ILEI-prezidanto Stefan MACGILL.

Sabaton kun belega aŭtuneca vetero, dum suna posttagmezo, ni ĝuis piedpromenon al la loka marĉejo kun meandroj de la rivero Odra, vesperan rigardon al la fiŝlago, el kiu antaŭ unu semajno oni jam eligis la karpojn, por ke ili estu formanĝotaj dum la kristnasktempo (sed ankaŭ ni almenaŭ

unufoje ĝuis tiun tute freŝan bongustaĵon), kaj la apuda pomarbejo priservis nin per forgesitaj bongustaj lokaj specioj de pomoj. Dimanĉon en la lerneja korto ni enplantis E-tilion kaj kelkajn aliajn arbustetojn, apud kiuj estos lokita E-benke. Se vi nun komencis bedaŭri, ke vi ne povis partopreni, Pavol KAŠČÁK (elp. Kaŝĉak), estro de Verda Stacio, kun sia helpanto Rosto atendas vin venontoktobre – la precizan daton vi jam ĉi-decembre povos ekscii en la paĝaro *www.esperanto.cz*. Do, iel vi venu al la dua IEL!

*Magdaléna FEIFIČOVÁ*

## **Indonezio**

La unua Esperanto-Kongreso en Indonezio okazos de la 5a ĝis la 8a de aprilo 2013 en Bogor, Javo. Ĝi jam estas historia, sed ĝi povus esti ankaŭ grava kongreso: ni antaŭplanas la fondon de landa asocio, kaj estas faritaj unuaj paŝetoj ankaŭ pri la fondo de TEJO- kaj ILEI-sekcioj. Ni havas esperojn pri minimume dekoj, ĝis centoj da partoprenantoj (maks. ebla nombro estas 120). Pro tre malavaraj donacoj de eksterlandanoj, la organizantoj povas proponi al la indonezianoj malaltan kotizon, kaj eĉ vojaĝsubvencion. Bonvenas pliaj eksterlandaj instruistoj kaj sperta(j) ILEI-rajtigita(j) ekzamenanto(j). Ĉiuj informoj, inkluzive ligilon al la aliĝilo estas kolektitaj en <https://sites.google.com/site/iek2013bogor/>.

Se iuj informoj mankas, bv. skribi al *heidi.goes@gmail.com* kaj/aŭ al la tuta LKK: *iek-lkk2013@googlegroups.com*.

*Heidi GOES*

## **Pollando**

Ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM komenciĝis la 15-a studjaro: la dua studjaro de la 5-a grupo. La persistaj partoprenantoj alvenis el pluraj landoj (Hungario, Svislando, Germanio, Rusio, triopo el Pollando kaj kvaropo el Brazilo). Kiel kutime okazis 4 kursoj: Vera BARANDOVSKÁ analizis kun la grupanoj la plej novajn planlingvajn projektojn enkadre de la interlingvistika kurso. Al la elstara kaj sindediĉa interlingvistino la grupo gratulis pro ŝia jubileo. István ERTL (redaktoro de *Beletra Almanako*) prezentis la verkistojn kaj verkojn de la literaturo de la 3a periodo. Michael FARRIS traktis semantikon kaj morfologion kaj Ilona KOUTNY okupiĝis pri E-a sintakso. Post la merkredaj ekzamenoj, dum la komuna vespero, kelkaj prezentis propran aŭ tradukitan verkon. Semajnfine kiel kutime okazis la kultura renkontiĝo Arkones (jam la 28-a!), al kiu kontribuis la gestudentoj de la Interlingvistikaj Studoj: Ivan COLLING (BR) diskutis la rolon kaj

influan de Kartezio, Guilherme JARDIM (BR) prezentis Brazilon, Mirejo GROSJEAN (CH) interese traktis Afrikon, kie ŝi regule agas, kaj Anina STECAY legis sian krimnovelon. Same la ĉeestantaj instruistoj kontribuis: Zbigniew GALOR traktis kulturan ekskludon, Istvan ERTL raportis pri Beletra Almanako kaj Ilona KOUTNY prelegis pri (ne)eŭropeco de E-o. Ni ĉiuj povis ĝui la aliajn abundajn kaj interesajn programerojn.

*Ilona KOUTNY*

## Konkurso de infan-desegnaĵoj

Ni invitas ĉiujn instruistojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn al tiu konkurso. Ankaŭ la gepatroj povas partoprenigi siajn infanojn.....

### Konkursaj reguloj:

Jara temo: *Strange ???.....fremduloj.....strangeĉo*

Formato: Centimetraj dimensioj, minimume 40x30

Kategorioj      A: ĝis 7-jara  
                    B: pli ol 7- ĝis 10-jara  
                    C: pli ol 10- ĝis 14-jara

Limdato: ĝis la 1-a de marto 2013.

Dorse de la desegnaĵo notu, E-lingve, la nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, kaj koncizan priskribon de la desegnaĵo.

Premioj estos atribuitaj po 3 en ĉiu kategorio.

Bonvolu sendi desegnaĵojn al: *Centre Culturel St Nazaire Esperanto, 38, rue de la Croix Fraîche, 44600 SAINT NAZAIRE (Francio)*

## Novaĵoj de edukado.net

### LIBERAJ STUDIOJ

La porinstruista retejo lanĉis novajn servojn printempe de 2012. En la KLERIGEJO troveblas la sekcio **LIBERAJ STUDIOJ**, kie oni povas kleriĝi kaj lerni pri aŭ pere de Esperanto, spektante, aŭskultante filmitajn aŭ sonregistritajn prelegojn de fakuloj, legante la resumon aŭ la kompletajn tekstojn de la materialo kaj solvante testojn pri la lernitaĵoj. En la 8 fakoj de LIBERAJ STUDIOJ jam troviĝas 15 prelegoj de 12 aŭtoroj. La unuopaj

lecionoj sekveblas sen ajna vicordo, laŭplaĉe kaj unuope, tamen la programo per resuma paĝo helpas memori, kiujn studojn oni jam faris, kiujn ne. La daŭre ampleksigitaj servoj de LIBERAJ STUDOJ estas senpagaj, necesas nur ensaluti la paĝaron. Post ensalutado, ĉe elŝuto de ajna leciono, aŭtomate kreiĝas propra resumpaĝo de ĉiu studanto kaj tio donos travidon al la uzantoj pri la jam plenumitaj studoj.

Ĝis la fino de novembro jam 50 personoj registriĝis ĉe la nova sekcio, kiu troveblas ĉe <http://edukado.net/klerigejo>. Novaj kursanoj kaj novaj prelegmaterialoj estas bonvenaj.

## **Jen la temoj**

### **Esperantologio - lingvistiko**

1. Anna Löwenstein: Landonomoj en Esperanto
2. Wera Blanke: Fiero kaj honto - (pri terminologio)
3. Renato Corsetti: Denaskismo

### **Instruado - Lernado - Metodologio**

1. Katalin Kováts: KER-ekzamensistemo kaj la referenckadro
2. Katalin Kováts: Eduko de plurlingva infano

### **E-literaturo kaj kulturo**

1. Mauro Nervi: Akademio Literatura de Esperanto
2. Nicola Minnaja: Ĉu kulturoj estas takseblaj?

### **E-movado**

1. Mogens Rude Andersen: Esperanto en Danlando (5 filmoj)

### **Lingvopolitiko**

1. Detlev Blanke: Pri la kialoj de la relativa sukceso de Esperanto
2. Zlatko Tišljar: Eŭropa identeco

### **Kulturo**

1. Vera Barandovská-Frank: Erasmo en Roterdamo (3 partoj)
2. Torben Svendsen, Mogens Rude Andersen kaj Aleksandro Kogan: Karen Blixen

### **Medicino, psikologio, sano**

1. Nicole Else: Asperger-sindromo kaj virinoj

### **Scienco**

1. Prof. Reinhard Selten – Nobelpremiito por ekonomio (intervjuo)
2. Mogens Rude Andersen: La dana astronomo Tycho Brahe

*Katalin KOVÁTS*

## Vokas la 46-a Konferenco de ILEI en 2013

Nia germana sekcio estas nia plej granda en la Ligo, laŭindike ĝi estis en 1949 unu el niaj kvin fondo-sekcioj, depost tiam ĝis nun ĝi regule liveris al ni estraranojn. Laŭ niaj esploroj, tamen nur dufoje okazis tiulande konferenco de ILEI: en 1968 kaj 1974. Ĝojige, do, ke la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI), invitas nin al Herzberg-Sieber en 2013.

**Datoj:** de vendredo la 12an de julio ĝis ĵaŭdo la 18an de julio 2013, kun tujposta vetureblo al Rejkjaviko, Islando por la Universala Kongreso.

**Loko:** Meze de Germanio, en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo), en la alloga urboparto Sieber. Ĝi estas administre parto de Herzberg am Harz sed geografie aparta – ĝi kuŝas en idilie bela valo, kiu formas enirejon al la Harz-montaro.

**Loĝado kaj manĝoj:** En 3-stela Esperanto-hotelo kaj restoracio Zum Pass, aŭ apuda same 3-stela Haus Iris, aŭ en feriodomoj – ĉu en Sieber, ĉu en aliaj partoj de Herzberg.

**Konferencejo:** Komunuma centro de la vilaĝo, kapabla akcepti 150 personojn, kun podio, bufedo kaj kunsidejo. Krome uzeblas lernejoj klasĉambroj en tuja apudeco. Ĉio en Sieber estas facile atingebla piede. Arbaraj promenetoj aŭ promenejoj estas tuj atingeblaj.

**Transporto:** alirebla de ĉiuj grandurbaj flughavenoj – ekz. Frankfurt, Dortmund, Berlin, Hamburg, Leipzig kaj – la plej proksima – Hannover) per trajno ene de ĉ. 3-4 horoj; ene de Eŭropo kaj en Germanio per oftaj rapidtrajnoj. ILEI poste pretigos konsilon pri alveno kaj akireblaj rabat-biletoj. Simile ĝi donos konsilojn, kiel optimume vojaĝi al Islando konferencfine; ILEI mem tamen ne organizos karavanon.



**Konferenca temo:** Aktualas la temo: ‘Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj’

La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa programo ‘Dumviva Lernado’, el kiu ankaŭ E-projektoj ricevas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi E-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj ktp.? Por aliri tiajn demandojn, ni okazigos 90-minutan atelieron kun superrigardo de kurantaj projektoj kadre de Komenio (junuloj) kaj Grundtvig (nejunuloj) kaj kun praktikaj konsiloj, kiel starigi kaj mastrumi tiajn projektojn.

**Kotizoj:** Bonvolu vidi la informojn en la ĉi-kuna aliĝilo. Rapide aliĝu! – provu esti la kvindeka aŭ la centa aliĝinto! En pli fruaj perretaj komunikoj aperis malĝusta monato -- la favora tarifo por frualiĝintoj validas nur ĝis la 31a de januaro, 2013.

**Paralela programo:** Ĉiujare venas grupo de plejparte polaj lernantoj al SALO – la Somera Arbara Lernejo. Tio okazas kadre de interŝanĝa programo kune kun lokaj junuloj. La intenco estas paralele kun nia Konferenco okazigi la kunvenon de SALO. ILEI planas malfermi tion ankaŭ al junuloj el aliaj landoj, pere de starigota ILEI-lernejo (la nomo ne definitivas!), iuspeca transformo de la siatempe sukcesa ILEI-gimnazio. Kiam en antaŭaj konferencoj ni arigis samloke ankaŭ junulojn kun propra programo, (i.a. en Örestrand, Bratislava, Matanzas) ni rimarkis ke tio tre pozitive influas la etoson. Praktike, paralela SALO (kiu okazos en tiu lernejo) donas al konferencanoj la eblon gvidi lecionojn por la SALanoj, kaj plie por povi spekti model-lecionojn.

**Speciala propono:** ILEI-lernejo por ĉ. 12- ĝis 18-jaraj lernantoj, kiuj ŝatus pasigi lernadon kun amuzado, sportoj, ekskursoj kun partoprenantoj de la Somera Arbara Lernejo. Ni proponos ankaŭ trejnsejsojn por instruemuloj, kiuj interesiĝas pri instrumentoj kaj eble jam partoprenis seminarion de ‘Flugiloj de malfacila vento’.

Ni emfazas, ke partopreno estas malferma al ĉiu, kiu kredas je la graveco de efika kaj multa instruado de nia lingvo – vi ne devas esti profesia instruisto, nek eĉ membro de la Ligo (kvankam ni promesas fari ĉion eblan por konvinki vin membriĝi!). **Bonvenon al Germanio!**

**A l i ĝ i l o**  
por la 46-a Konferenco de ILEI  
Herzberg am Harz/Sieber, 12-18 julio 2013



- Alvdato: 2013.07.\_\_\_\_, foriro 2013.07. \_\_\_\_
  - Persona nomo \_\_\_\_\_
  - Familia nomo \_\_\_\_\_ Ino  / Viro
  - Lando \_\_\_\_\_ Kodo, urbo \_\_\_\_\_
  - Loĝadreso \_\_\_\_\_
  - Retadreso \_\_\_\_\_ Fakso \_\_\_\_\_
  - Telefono \_\_\_\_\_ Poŝtelefono \_\_\_\_\_
  - Naskiĝdato (jjjj-mm-tt) \_\_\_\_\_ Profesio \_\_\_\_\_
  - Mi konsentas, ke mia adreso aperu en la partoprenlisto: jes  ne
  - Mi partoprenos la instrukapabligan klerigmodulon ('Flugiloj')
  - Mi estas malpli-ol-18-jara kaj partoprenos la ILEI-lernejon (SALO-8)
  - Mi bezonas invitilon. Mia pasporto kun numero \_\_\_\_\_  
de la ŝtato \_\_\_\_\_ validas ĝis \_\_\_\_\_
  - Mi komprenas, ke la aliĝo kaj servo-mendoj validas nur post kompleta  
pago en unu el la jenaj manieroj (indiku vian pagmanieron):
  - Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855,  
BIC: INGBNL2A. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
  - Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante "ILEI-konferenco 2013"
  - En Germanio: Bankkonto – Volksbank Schmallenberg, BLZ 46062817,  
Konto N-ro 5187110500.
  - Mi kontribuos al la konferenca programo/internacia vespero per:  
\_\_\_\_\_
  - Mi akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn cititajn ĉe**  
*<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=27774578>*  
**kaj aparte deklaras, ke mi havas validan san- kaj akcident-sekuron**  
**por mia restado en Germanio dum la 46-a ILEI-konferenco.**
- Loko, dato \_\_\_\_\_ Subskribo \_\_\_\_\_

Bv. sendi la aliĝilon al: **Esperanto-Centro, zsofia.korody@esperanto.de**  
**DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Germanio**

**Kotizoj:** La baza aliĝkotizo dependas de du landokategorioj kaj la aliĝdato.  
(Loĝado, manĝado, ekskursoj k.a. servoj pagendas aparte).

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B: Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Aliĝperiodo:	ĝis 31.03.2013		ĝis 30.06.2013		post 30.06.2013	
Aliĝkategorio:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI (1)	50 €	30 €	60 €	35€	70 €	45 €
Ne-membro	65 €	40 €	75 €	45 €	90 €	55 €
Junulo(2), handik.(3)	25 €	15 €	30 €	20 €	35 €	25 €

**Rabatitaj prezoj:** frualiĝanto ĝis 31.01.2013: A: 40 EUR, B: 25 EUR  
50% por la kvindeka kaj 100% por la centa aliĝintoj

(1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2013.

(2) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1981. (3) Handikapulo bv. atesti al ILEI. Aliĝkotizo por unu tago estas 25 € kaj por A- kaj B-landanoj.

Mi kotizas kiel A  / B  landano (elektu el la kategorioj de la tabelo)

ILEI-membro , ne-membro , junulo , handikapulo : \_\_\_\_\_ EUR

#### Loĝado, servoj, ekskursoj, donaco:

Prezoj por tranoktado por 1 persono/nokto inter 12-18 de julio 2013.

Mi mendas loĝadon en la elektita kategorio laŭ la ĉi-sube indikitaj kondiĉoj kaj pagos la kotizon por ĉambroperado ..... 3 EUR

2-lita ĉ. Haus Iris: 38 EUR kun matenmanĝo por ..... noktoj: \_\_\_\_\_ EUR

3-lita ĉ. Haus Iris: 32 EUR kun matenmanĝo por ..... noktoj: \_\_\_\_\_ EUR

2-lita ĉ. Zum Pass: 38 EUR kun matenmanĝo por .... noktoj: \_\_\_\_\_ EUR

3-4 lita Zum Pass: 32 EUR kun matenmanĝo por .... noktoj: \_\_\_\_\_ EUR

komforta apartamento en feriodomo. Antaŭpago por rezervi: 30 EUR, kiun LKK repagos post via alveno. Kotizoj por tuta domo (ĝenerale 1-4 personoj) varias inter ĉ. 15-50 EUR tage, depende de nombro de kunloĝantoj, servoj, manĝo. La verajn kostojn vi mem pagos al la domposedantoj!

Mi partoprenos la bankedon (A-lando 40 EUR, B: 35 EUR) \_\_\_\_\_ EUR

Mi kontribuas por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j) / agado(j):  
\_\_\_\_\_ kaj pagas \_\_\_\_\_ EUR

**Ekskursoj:** DT1 duontaga per buso al Harz-montaro/Goslar ..... 25 EUR

DT2 duontaga per trajno al Göttingen..... 25 EUR

TT1 tutaga per trajno al Hannover ..... 40 EUR

**Entute pagenda** (aliĝkotizo, tranoktado, ekskursoj, ktp.) \_\_\_\_\_ EUR

**Loko, dato** \_\_\_\_\_ **Subskribo** \_\_\_\_\_





*Partoprenantoj de la Somera Arbara Lernejo (SALO-6, en 2011)*

## Informoj pri ILEI

### Laborkomisionoj

---

**Ekzamena:** Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Karine Arakelian (sekretario, arkivisto), Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Tiekko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

**Kontrolo:** Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

**Lerneja:** Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekko Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill).

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: *vakas*).

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat.

### Kunlaborantaj institucioj

---

**EEU:** *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi).

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Viŝazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net).  
Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj  
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.  
Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsejtoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de).

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Bharat Ghimire**.

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

**UEA**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto kaj A-komitatano de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

**UN** (Unuiĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leysester Miro**.

**UNESKO** (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, [francois.lojacomo@wanadoo.fr](mailto:francois.lojacomo@wanadoo.fr); **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr); **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

## Membreco kaj pagado por aliaj servoj

**Membreco kostas 20 € en A-landoj** (laŭ UEA-difino) **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

\* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

\* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldone de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

\* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

\* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## Redakciaj informoj

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <[jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com)>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <[moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com)>.

**La nunan numeron ni sendis al la presejo la 9-an de decembro 2012, redaktfino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2013.**



*Japana kaj sud-afrika esperantistinoj en Kaburbo. Pri Kaburbo legu sur p.22.*



*Ekzamena salono en Benino. Vidu la artikolon de Mirejo Grosjean sur p.31.*

